# Persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo en Soveta Unio,
# laŭ la historiaj studoj de Ulrich Lins, 6-a parto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 608, 1975.06.04 & 07

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Nin bazante sur la historiaj priskriboj de Ulrich Lins ni raportis dum la tuta monato majo pri la persekutoj kontraŭ la esperanto-movado en Sovetio kaj en ties satelitaj ŝtatoj dum la epoko de la stalisnismo.

A.- Ni memorigas, ke tiu sistema neniigo de la esperanto-movado komenciĝis en Sovetio en 1937/1938, en la baltaj landoj en 1940, en la orient-eŭropaj landoj ekde la jaroj 1949/1950, kaj fine en Popola Ĉinio en 1952/1953.

Cl.- La morto de Stalin je la 5-a de marto 1953 kaŭzis veran intelektan revolucion. Ekde tiam la person-kulto finiĝas aŭ estas eĉ malpermesata, kaj la oficiala politiko prenas novan direkton. Esperanto ĉesas esti konsiderata kiel danĝera lingvo, kiun oni devas malaperigi persekutante ties adeptojn.

A.- La plej videbla ŝanĝo de la strategio de Soveta Unio kaj de ties aliancanoj rilate al esperanto rimarkiĝas dum la Konferenco de Unesko en Montevideo en decembro 1954, kiam la sovetaj delegacioj per sia sindeteno permesis la akceptadon de la Rezolucio agnoskanta la kulturan valoron de esperanto.

Cl.- Poste la ekzisto mem de tiu Rezolucio favora al esperanto estis instrumento, kiun la esperanto-organizaĵoj sub la lerta gvidado de d-ro Ivo Lapenna, prezidanto de UEA, ne hezitis uzi je sia profito. Ĝi certe ankaŭ helpis la esperantistojn vivantajn en Soveta Unio kaj en la aliaj komunistaj landoj, inklutizive de Polola Ĉinio, kies rilatoj kun USSR pli kaj pli malboniĝis.

A.- Sed tiu pezento de la ĉeso de la persekutado kontraŭ esperanto en la komunistaj landoj donas impreson, ke la situacio ŝanĝiĝis dank'al intervenoj el la ekstero. Jes, tiu interveno ludis gravan rolon, sed la kuraĝaj agadoj de unuopuloj, kiel la hungaro Pál Balkányi kaj la ĉeĥoslovako Rudolf Burda, estis decidigaj.

Cl.- Pri la eksteraj intervenoj ni ne devas forgesi la kunordigitan agadon de UEA kaj de SAT. En majo 1952 la Estraro de UEA kaj la Plenum-komitato de SAT per komuna *Nefermita Letero al Stalin* nete atribuis la kontraŭ-esperantan politikon de Soveta Unio al lingva imperiismo. Koncerne tiun agadon Ulrich Lins skribas :

A.- « *Ne subtaksenda estas* […] *la precedenca karaktero de tiu ĉi dokumento, per kiu la internacia Movado por la unua fojo oficiale forlasis la pozicion de neŭtralismo kaj senhelpa spektado, tiel ofte spertitaj, kiam Esperanto kaj ĝiaj parolantoj suferis persekutojn.* »

Cl.- Pri la interna laboro de la kuraĝaj esperantistoj, kies nomojn ni ĵus citis, ni ankaŭ legu al vi dirojn de Ulrich Lins :

A.- « La reviviĝo de la Esperanto-Movado en Soveta Unio] *apartenas al la plej interesaj ĉapitroj en la historio de la Internacia Lingvo. Estas ekster la kadro de tiu ĉi priskribo detale analizi tiun modelkazon de esperantista celkonscio, kontraŭ-aŭtoritata obstino kaj saĝa kaj*

*prudenta agado ĉe la* bazo *; sed evidente la unua iniciato ŝuldiĝas al kelkaj kuraĝaj unuopuloj en la popoldemokratioj, inter aliaj Pál Balkányi en Hungario kaj precipe Rudolf Burda en Ĉeĥoslovakio, kiuj klopodis unue reakiri permeson por la Movado ĉe sialandaj instancoj, sed, vidinte, ke la ĉefa obstaklo estas la mankanta modelo de floranta Esperanto en Soveta Unio, decidis reveki la delonge mortintan Movadon tie.*

Cl.- *Per iliaj leteroj Bokarev kaj aliaj unuafoje eksciis en 1954/1955, ke ankoraŭ ekzistas Esperanto-Movado en okcidentaj kaj orientaj landoj. La bulteno* ***La Pacdefendanto*** *kaj la organo* ***Paco*** *estis grandparte liveritaj al Soveta Unio. Ili aperigis la unuajn korespond-anoncojn de Sovet-unianoj kaj koordinis la lokan aktivadon de esperantistoj* (en « pac-rondoj ») *en landoj sen organizita Movado. »*

A.- La organo « ***Paco*** *daŭre kuraĝigis la esperantistojn, el kiuj multe preferis atendi decidon de supre. Ĝi atentigis ilin, ke utiligo de Esperanto por la paco ja kongruas kun la rezolucioj de Mondpaca Konsilantaro.* Ĝi skribis, ke *ne eblas vin persekuti pro la plenumo de ties decidoj* kaj ĝi instigis la esperantistojn *ne lasi sin puŝi en ilegalecon. »*

Cl.- *Tiun strategion sendube akcelis la surpriza sinteno de Soveta Unio kaj de ties aliancanoj dum la Konferenco de Unesko en Montevideo en decembro 1954.* […] *La plua evoluo estas konata : En 1955 la pola Asocio denove aliĝis al UEA, en la sekvantaj jaroj ankaŭ la bulgara, hugara kaj ĉeĥa, en 1957 ekaperis* **Nuntempa Bulgario** *amase distribuata al Soveta Unio, kaj de tiam la progreso de la Internacia Lingvo en tuta orienta Eŭropo iĝis ne plu haltigebla. »* (Fino de la citaĵo.]

A.- Dum tiu ĉi prelegaro ni povis nur resume raporti pri la diskriminacio okazinta en la komunistaj landoj kontraŭ nia lingvo. Se vi deziras detale informiĝi pri tiuj persekutoj, ni konsilas al vi la legadon de la kvina parto de la enciklopedio ***Esperanto en Perspektivo***, kiun UEA ĵus eldonis.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

---

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch*
*Prilaboris: Stefano KELLER, julio 2012*